

**La 5-an de Aŭgusto en la aĝo de 76 jaroj forpasis nia amiko Dominik Kornis.** Naskiĝinta en 1949, Dominik multe interesiĝis pri fremdaj lingvoj kaj lernis Esperanton en 1966 de sia intruisto pri la rusa en la regiono pariza, kie li tiam loĝis. Teleksisto kaj poste komputila programisto, li retiriĝis en Hérouville en 2017. Okaze de la festo de la asocioj ni renkontis lin. Li aniĝis nian klubon sed pro sanproblemoj tre malofte ĉeestis niajn kunvenojn. Li tamen vigle aktivis kiel korektanto de la Normanda Esperanto-Bulteno, kiu multe ŝuldas al li, kaj nelacigeble redaktis multajn artikolojn en Vikipedio. Ses klunanoj adiaŭis lin ĉe la tombo kaj kondelancis lian fraton kaj liajn familianojn.



Fotis Mišel el Caen

## Frontartikolo

### **Le congrès 2026 d'Espéranto-France se déroulera-t-il à Hérouville Saint-Clair?**

Edmond Privat rapporte que, pendant l'été 1903, "la grupo en Le Havre invitis kelkajn esperantistoj al publikaj kunsidoj (...) el ĉi tiu provo devenis la Universalaj Kongresoj de Esperanto". Quatre congrès nationaux ont ensuite été organisés en Normandie, trois d'Espéranto-France (qui s'appelait alors SFPE puis prit, en 1945, le nom d'UFE), en 1930 et en 1965 au Havre et en 1988 à Rouen. Un congrès de SAT-Amikaro s'est déroulé plus récemment, à Hérouville Saint-Clair, en 1993. C'était il y a plus de 30 ans...

Espéranto-France nous a demandé d'organiser en Normandie le congrès 2026.

**Le groupe de préfiguration** constitué de juin a pris les premiers contacts qui confirment que nos partenaires sont disposés à accompagner ce projet.

**Il présentera ses travaux lors de notre réunion de rentrée le 9 septembre.**

**À notre assemblée générale, qui se réunira le 4 octobre, de décider finalement de notre réponse et de notre engagement dans ce projet riche mais exigeant.**

**Cette journée du 4 octobre sera aussi l'occasion de renouer avec un tradition : celle de la journée régionale, à laquelle nous espérons voir s'associer tous les espérantistes normands isolés et tous ceux qui, venus d'ailleurs, le souhaitent.**

## Enhavo

|                                                                    |             |
|--------------------------------------------------------------------|-------------|
| Ĝenerala kunsido de Hérouville-Espéranto.....                      | 2           |
| Malfermita regiona kunveno .....                                   | 3 & 20      |
| Novaĵoj el Ĉinio.....                                              | 4 & 5       |
| Nia ginko havas fratojn!.....                                      | 6           |
| À Hérouville, 1 naissance = 1 arbre planté .....                   | 6 & 7       |
| Esceptaj arboj en Bajozo.....                                      | 8           |
| Ludu ni kun arboj .....                                            | 8           |
| Renkontiĝo kun Marcel, esperantista monaĥo, fakulo pri Lanti ..... | 9 & 10      |
| Kaeno festas la 1000-jara datrevenon de sia fondiĝo (1/2) .....    | 11 & 12     |
| Literatura paĝo .....                                              | 14          |
| Komputa paĝo .....                                                 | 14          |
| Ili staĝis, ili kongresis .....                                    | 15, 16 & 17 |
| Tra niaj malnovaj bultenoj.....                                    | 18          |
| Nia kluba vivo, tagon post tago.....                               | 19          |



## Kotizoj 2025-2066

2

Lors de son assemblée générale de janvier 2025, notre club a adhéré au **dispositif de cotisation interassociative porté par Espéranto-France.**

En réglant votre cotisation, **vous deviendrez simultanément membre, pour la période du 1<sup>er</sup> octobre 2025 au 30 septembre 2026 et d'Hérouville-Espéranto et d'Espéranto-France.**

Si vous êtes imposable, vous bénéficierez d'une réduction d'impôt de 66 %.

**Les cotisations sont à régler à partir du 1<sup>er</sup> octobre en ligne sur [le site d'Espéranto-France](#).**

**N'effectuez aucun paiement avant cette date, sous peine de voir votre règlement comptabilisé sur l'année précédente.**

Vous pourrez aussi y télécharger un formulaire d'adhésion papier si vous préférez régler par chèque.

### Montant des cotisations :

- **Plus de 36 ans, imposable : 65 € (H-Eo. 35 + Eo-F. 30) soit 22,10 € après déduction fiscale.**
- **Moins de 36 ans, imposable : 50 € (H-Eo. 35 + Eo-J. 15) soit 17,00 € après déduction fiscale.**
- **Plus de 36 ans, non imposable : 22 € (H-Eo. 10 + Eo-F. 12).**
- **Moins de 36 ans, non imposable : 10 € (H-Eo. 5 + Eo-J. 5).**

Ceux qui souhaitent adhérer à Hérouville-Espéranto mais qui, pour des raisons de santé ou d'éloignement, ne peuvent prendre part que de façon très exceptionnelle à nos activités peuvent, par dérogation, adhérer à Hérouville-Espéranto en qualité d'amiko, sans adhérer à Espéranto-France..

Ce faisant, il sont pleinement membres d'Hérouville-Espéranto et peuvent prendre part aux assemblées générales et participer aux instances de notre association..

Cette formule n'ouvre cependant droit à aucune déduction fiscale.

### **Montant des cotisations des "amikoj" :**

- **Plus de 36 ans : 15 €**
- **Moins de 36 ans : 10 €**

Votre cotisation peut être réglée :

- par chèque à adresser à Christian Marlier, 11 rue des Frères Lumière, 14000 Caen
- par virement bancaire sur le compte "Hérouville-Espéranto"

IBAN : FR 76 1027 8021 2700 0212 2800 162 BIC : CMCIFR2A - Caisse de Crédit Mutuel de Caen Centre

### **Listo de la 29 kotizintoj 2024-2025**

Brunet V., Caron-Liray S., Charles V., Colbert J., Cottin B., Dalibert F., Danel K., Danel J., Dion C., Dufeu P., Duflot M., Ferrand C., Fortin F., Fortin J.-M., Girard V., Hardel E., Langeois M., Lemarié S., Leprévost A.-M., Marlier-Riquier C., Plantade F., Roussigné S., Sauvage J.-P., Sénécal Gé., Sénécal Gi., Tarlevé B., Troisgros R., Verstraete B., Verstraete V.



**Pas encore espérantiste ? Rejoignez-nous !**

**Nos cours se déroulent tous les mardis (hors vacances scolaires) de 17 h 30 à 19 h 00 à la Maison des Associations : 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair**

Si vous ne pouvez pas nous rejoindre, vous pouvez participer au **cours en ligne gratuit I-Kurso**. Un **correcteur** vous sera attribué pour accompagner votre progression au cours des **10 leçons** que vous suivrez à **votre rythme**.

**Renseignements :** [esperanto.herouville.14200@gmail.com](mailto:esperanto.herouville.14200@gmail.com)

# Ni kunvenos la 4-an de Oktobro... Estu kun ni!

3

## 1. Ĝenerala ĉiujara kunsido 2025-2026 (membroj de Hérouville-Espéranto)

L'assemblée générale annuelle d'Hérouville-Espéranto se tiendra :

- à l'ancienne bibliothèque du Plateau,
- 2 rue de l'Hôtellerie à Mondeville,
- le samedi 4 octobre 2025, à 09 heures 00.
- Elle sera suivie, à partir de 10 heures 30, de la traditionnelle journée régionale à laquelle sont invités les espérantistes d'ici et d'ailleurs (voir page suivante).

### ORDRE DU JOUR PRÉVISIONNEL :

- Rapport d'activité et rapport financier de l'année 2025
- Élections statutaires
- Décision concernant l'organisation du Congrès d'Espéranto-France
- Plan d'action 2025-2026
- Budget 2025-2026
- Questions diverses.



## 2. Esperantista regiona kunveno malfermita. (Ĉiuj estas bonvenaj!)

### Normands d'ici, Normands d'ailleurs.

avec le concours de l'association Mémoire & Patrimoine SMN.

*Contribution des travailleurs immigrés à l'essor industriel de la Normandie au XXème siècle. L'exemple de la SMN.*

08 heures 45 : Café d'accueil.

09 heures 00 : Assemblée générale d'Hérouville-Espéranto.

10 heures 20 : Pause, accueil des participants qui, n'étant pas membres d'Hérouville-Espéranto, ne participent pas à l'AG.

10 heures 40 : Conférence de Marc Pottier, historien, auteur de "Normands de tous pays" (Cahiers du Temps, 1999).

12 heures 20 : Apéritif offert par le club

12 heures 40 : Repas

14 heures 30 : L'Esperantista Grupo de Mondeville dans les années 30 à la SMN. Disparu sans laisser de trace ?

15 heures 30 : Conférence déambulatoire (partiellement en espéranto) à travers la cité-jardin du Plateau, à la découverte des parcours des ouvriers venus d'ailleurs et de leur contribution au développement de l'industrie sidérurgique normande, conduite par d'anciens travailleurs de la SMN de l'association Mémoire et Patrimoine SMN.

17 heures 30 : fin de la journée.



Historien, auteur de nombreux ouvrages, notamment consacrés aux questions migratoires et au patrimoine industriel, Marc Pottier a été le directeur pédagogique et de la recherche scientifique du Mémorial de Caen et le directeur de la Fabrique de Patrimoines en Normandie. Conseiller historique pour de nombreux médias, il est aussi maire de Colombelles et vice-président de la Communauté urbaine de Caen la Mer, en charge de la culture.

La urbo Zaozhuang (枣庄) situas 650 kilometrojn sude de Pekino, en la provinco Ŝandongo. Loĝas 1,13 miliono da homoj en la urbo mem. Oni nombras 3,67 milionojn da loĝantoj en la metropola regiono de 4550 km<sup>2</sup> (La loĝodensito estas 8 fojoj pli alta ol tiu de Normandio).

La tiea Esperanto-movado estas tre aktiva. Zaozhuang-a Universitato, kie troviĝas la plej granda Esperanto-muzeo en la mondo iniciatis en 2011 kvarjar-studan Esperanto-kursaron kun literatura bakalaŭro, samtempe studentoj studas la anglan kaj ĉinan lingvojn, interretan komercadon kaj amaskomunikadon.

## La Esperanta ginko de Normandio kaj la Esperanto-arbaro de Zaozhuang



Lastatempe mi devis elekti revuon por analizi ĝin por ekzameno pri Esperanta ĵurnalismo ĉe la Universitato de Zaozhuang en provinco Ŝandong de Ĉinio, kie mi estas studentino en la kvar-jara Esperanto-fako. Inter ĉiuj ebloj, multe allogis min la plantadon de la Esperanta ginko en la paĝoj de la Normanda Bulteno. Ĝi estis la unua kialo por elekti vian revuon, krom la multaj aspektoj de franca vivo, kiujn ĝi prezentas. Fakte, mi multe ŝatas tiun arbon, kiu estas unu el la plej antikvaj arbospecioj sur la Tero, havas printempe belajn verdajn foliojn kaj en aŭtuno iĝas granda etendo de ora koloro. En Ĉinio ĝi havas ankaŭ ekonomian signifon, ĉar la frukto de la duloba ginko — aŭ ginkonukso — estas tradicia medikamento por malsekigi pulmojn, malpezigi tuson kaj plibonigi memoron.

En Ĉinio, ginko estas rigardata kiel unu el la naciaj arboj. Ĝia longa historio datas de la Shang- kaj Zhou-dinastioj. Ĉar ĝia vivdaŭro povas atingi milojn da jaroj, ĝi estas rigardata kiel "longviveca arbo" kaj estas ofte plantita apud temploj kaj antikvaj konstruaĵoj, simbolante la daŭrigon de historio kaj la heredon de kulturo. Por ni ĉinoj ginkoj ankaŭ signifas persistemon, multajn infanojn, amon, unuecon kaj harmonion, esperon kaj renaskiĝon. Do, estas signifoplene, ke la normandaj samideanoj elektis planti por Esperanto ĝuste tiun ĉi arbon, kiu ne nur riĉigas la naturan pejzaĝon, sed ankaŭ portas profundajn kulturajn memorojn kaj fortan esperon por la estonto. Ĝi estas ja forta ligo inter la Oriento kaj la Okcidento. Iom similan senton ni povas trovi en la Internacia Esperanto-Arbaro en Zaozhuang kiel verda ligo por kultura integriĝo. Ĝi estas unika loko kaj por ni kiel brila perlo sur la mapo de la Esperanto-kulturo.



Tiu Esperanto-tema memorarbaro, fondita de s-ro Sun Shoude, konsistas el diversaj partoj dediĉitaj al Esperanto, Esperanto-amikeco, Esperanto-organizo kaj la Memoro de Forpasintaj Samideanoj. Ĝis nun pli ol 800 esperantistoj el Aŭstralio, Ĉinio, Francio, Hispanio, Italio, Japanio, Kanado, Nepalo, Pollando, Sud-Koreio, Svislando kaj Usono donacis monon por adopti arbojn. Estas jam memorarboj por preskaŭ cent esperantistoj, inkluzive de la fama ĉina verkisto Bakin (Ba Jin) kaj kompreneble Zamenhof mem. Ĉi tiu Esperanta arbaro estas la perfekta kunfandiĝo de Esperanto-kulturo kaj natura pejzaĝo. Ĉiu arbo ene portas specialan signifon, ĉar ĝi simbolas amikecon inter Esperanto-parolantoj el la tuta mondo. Multaj samideanoj eĉ venis ĉi tien de malproksime por viziti la Esperanto-Museon de la Universitato de Zaozhuang kaj planti arbidojn en la Arbaro aŭ helpi nin aldoni al ĉiu el ili nom-tabuleton. Tiu ĉi ago praktike montras nian esperon, ke la Esperanto-kulturo



same floro kaj prospero. La Internacia Esperanto-Arbaro estas ne nur verda pejzaĝo, sed ankaŭ grava loko por Esperanto-kultura interŝanĝo, kie ofte okazas diversaj agadoj. Lokaj kaj vizitantaj esperantistoj kunvenas por interŝanĝi ideojn kaj paroli pri la tradicioj, kutimoj kaj praktikoj de siaj respektivaj landoj. Diversaj kulturoj kolizias ĉi tie por krei brilajn fajrerojn. Ĉinaj esperantistoj povas kundi la longan historion kaj kulturon de Ĉinio, de antikva konfuceismo ĝis moderna teknologia disvolviĝo, por ke eksterlandaj amikoj havu pli profundan komprenon de nuntempa Ĉinio. De unu

flanko, fakte, Zaozhuang troviĝas proksime de la naskiĝloko de Konfuceo kaj lia posteulo Mengzi (Menceo) verkis ĉi tie parton de sia libro. De la alia flanko, ĝi estas nun pionira urbo en la produktado de baterioj por elektraj aŭtomobiloj, kio estas tre forte kreskanta sektoro de la landa ekonomio.

La ekzisto de la Esperanto-Arbaro ankaŭ antaŭenigis la disvastigon de Esperanto en Ĉinio kaj donis novan energion al la Shandong-a Esperanto-Klubo, ĉar kelkaj lokanoj interesiĝis pri Esperanto danke al ĝi. Ekde la komenco, ĝi uzis la verdan lingvon por esprimi la belajn atendojn de la Esperanto-parolantoj pri kultura interŝanĝo kaj mondpaco, kunlige al la nepra respekto por la naturo. Mi kredas, ke la Esperanto-ginko de la normandaj samideanoj bele kunportas la samajn valorojn kaj ĝi same reprezentas ŝancon de loka kaj internacia videbleco por antaŭenigi ilin. Mi kredas, ke ambaŭ la Normanda Ginko kaj la Esperanto-Arbaro de Zaozhuang daŭre brilos kaj helpas la disvastigon kaj disvolviĝon de la Esperanto-kulturo tra la mondo.



Verkis Jadofama  
(Gao Mingyu) el Ĉinio



枣庄学院  
ZAOZHUANG UNIVERSITY

### Pri mia kurso pri Esperanta Ĵurnalismo

Mia studentino Jadofama sendis al la *Normanda Esperanto-Bulteno* belan artikolon pri ginko, kiun ŝi verkis kiel finan ekzamenon por mia kurso pri Esperanta Ĵurnalismo en Zaozhuanga-Universitato.

Kiel eble la legantoj scias, temas pri la ununura universitato en Ĉinio kun aktiva Esperanta fako rekonata de la Ĉina Registaro. Jadofama estas en sia tria jaro kaj jam regas la lingvon sufiĉe bone por sekvi kursojn ne nur pri Esperanto, sed en ĝi.

Mia kurso pri ĵurnalismo dividiĝis en du partojn. En la unua ni lernis pri la fenomeno de komunikila konverĝo kaj precipe pri kiel ĝi influas tradiciajn Esperantajn komunikilojn kiel Ĉinan Radion Internacian, kiu nun iĝis parto de la grandega Ĉina Komunikila Grupo kune kun la ŝtata televido CCTV.

Tiu ŝanĝo malfermis oportunojn, sed ĝi ankaŭ kreis problemojn kaj estigis la neceson eduki malsaman tipon de ĵurnalistoj.

En la unua parto de la kurso ni ankaŭ lernis, ke konverĝo povas ankaŭ esti ŝanco por niĉ-komunikiloj kun sia aparta publiko kaj ni parolis tiusence pri Esperantaj revuoj. Do, mi decidis dediĉi al tiu temo la duan parton de la kurso kaj uzi la mez-semestran kaj la finan ekzamenojn por praktike famigli la studentojn kun diversaj Esperantaj periodaĵoj. En la unua, ĉiu studento devis analizi numeron de sia elektita revuo. Por la dua, ili devis analizi pli funde malsaman revuon, mem verki artikolon, kiu povus taŭgi por ĝi kaj ĝia publiko kaj mem kontakti la redaktoron. Jadofama elektis vian revuon, ankaŭ ĉar ŝi multe ŝatis la parton pri la ginko, kiu estas tre grava arbo en la ĉina kulturo. Kompreneble ni ambaŭ tre ĝojas, ke vi tiel afable respondis kaj ke vi publikigos ĝin. Koran dankon!

Alessandra Modella  
vicprezidantino de ILEI

## Les Zeoj... c'est quoi ?

Dans le monde espérantiste, on parle de Zeoj... Les Zamenhofaj Esperanto-objektoj... (les objets espérantistes Zamenhof). Ce sont des objets ou des lieux ... rues, places, squares, bustes ... qui portent un nom relatif à l'espéranto ou à son créateur Louis Lazare Zamenhof.

Les Zeoj contribuent à faire connaître la langue internationale espéranto. Il existe des Zeoj dans beaucoup de pays du monde.

Parmi ces « objets », il en est de plus rares... les arbres... On en trouve cependant dans plus d'une dizaine de villes en France. Le plus souvent planté est le ginkgo biloba, le seul arbre à avoir survécu au bombardement d'Hiroshima.

On trouve des Zeoj dans beaucoup de pays du monde, les plus nombreux au Brésil, suivi par la France, mais difficile cependant de tenir des statistiques exactes...

Le plus ancien Zeo est un bateau espagnol nommé Esperanto en 1896.

Le Zeo le plus nordique se situe à 1 250 km du pôle Nord. Il s'agit de la presqu'île de l'espéranto « Esperantoneset » dans l'île norvégienne de Spitzberg.

Les Zeoj qui nous sont les plus éloignés sont les astéroïdes Esperanto et Zamenhof découverts en 1934 et 1936.

## Esperantistaj arboj el ĉiuj regionoj, uniĝu!



Bourg-en-Bresse (01)  
La Ciotat (13)  
Hérouville St-Clair (14)  
Quintin (22)  
Chamborigaud (30)  
Eysines (33)  
Herbignac (44)  
Hennebont (56)  
Bersée (59)  
Valenciennes (59)  
Arras (62)  
Pau (64)  
Gray (70)  
Torcy (71)  
Aix-les-Bains (73)  
Chambéry (73)  
Correns (83)  
Bondy (93)  
Choisy le Roi (94)

Kompreneble, nia ginko ne estas la sola esperantista arbo en Francio!

Kun la helpo de Raymonde Coquisart ni listigis la arbojn, kiuj omaĝas al Esperanto aŭ al Zamenhoj.

**Sciigu al ni pri alia nelistigita esperantista arbo, konata de vi. Krome, ni ŝatus kolekti fotojn de ĉiuj fratoj de nia arbo.**



Verkis Raymonde Coquisart  
Estraranino de Esperanto-France  
Bultenistino de Esperanto Aktiv'

## Aliaj normandiaj simbolaj arboj

**À Hérouville Saint-Clair,  
une naissance = un arbre planté,  
une opération très appréciée**

Depuis mars 2021, à l'initiative de Laurent Mata, premier maire-adjoint, autant d'arbres sont plantés que de naissances d'enfants dans la ville. Deux cérémonies par an sont organisées, sur le lieu des plantations, à l'automne et au printemps.

Les familles sont invitées à venir chercher un certificat qui atteste de la plantation d'un arbre dans leur ville à l'occasion de la naissance de leur enfant. Elles sont nombreuses à répondre positivement. Le nombre de naissances dans les familles hérouvillaises est stable depuis quelques années : environ 240 naissances par an (une légère baisse est constatée ces dernières années). Ainsi, avec « Une naissance = un arbre » près de 1.200 jeunes arbres ont été plantés au Bois de Lébissey depuis le début de l'opération. L'équipe municipale souhaite que ces plantations se poursuivent prochainement ailleurs dans la ville.



La remise du certificat par des élus est toujours un moment émouvant. Les familles viennent nombreuses et elles ont plaisir à se prendre en photo devant les plantations. Cette cérémonie, qui associe la naissance de leur enfant à une action positive pour les générations à venir, est l'occasion pour Laurent Mata de rappeler les nombreux bénéfices environnementaux de la plantation d'arbres : la lutte contre le changement climatique et contre les îlots de chaleur en milieu urbain, la préservation de la biodiversité et l'amélioration de la structure des sols. Les familles y contribuent ainsi de manière concrète et joyeuse. Cette opération existe ailleurs, chaque territoire l'adapte. Son succès à Hérouville Saint-Clair est lié à la grande sensibilité des Hérouvillais à la végétalisation de la ville. Celle-ci peut se vanter d'avoir la plus grande canopée de l'agglomération de Caen-la-Mer. (14,7% de son territoire selon le rapport Aucame de février 2025, soit 150 hectares). Les espaces verts de la ville s'étendent sur une surface de 470 hectares.

Les jeunes arbres plantés sont d'essences variées : charme, merisier des bois, orme champêtre, noyer à fruit, érable champêtre, chêne pédonculé, châtaignier, pin sylvestre. Ces plantations s'ajoutent à celles réalisées chaque année dans le cadre de l'entretien des espaces verts. Si un des arbres meurt, il est remplacé.

Verkis kaj fotis  
Marie-Laure Thillays  
Komunumo Hérouville Saint-Clair  
Komunikado-Departemento

Verkis Kristiano  
kaj Joel' el Bajozo.

## Esceptaj arboj en Bajozo (Bayeux)

La normanda urbo Bajozo fieras kalkuli almenaŭ du esceptajn arbojn: platanon kaj plorantan fagon. Ili ambaŭ estis listigitaj naturaj monumentoj en 1932, kaj agnoskitaj rimarkindaj arboj de Francio en 2000.

### La platano de la libereco.

Proksime de la katedralo, la Arbo de la Libereco situas sur la samnomita placo, iama interna korto de la palaco de la bajozaj episkopoj, nuntempe ĉefsidejo de la urbodomo.

Ekde 1793, la konstruaĵoj de la malnova episkopa palaco, ŝtatigitaj kiel nacia bono dum la franca revolucio, estis dediĉitaj al la civila administrado. La 10-an de Ĝerminalo de la jaro V laŭ la franca respublika kalendaro, i.e. la 30-an de Marto 1797, acer-folia platano (aŭ ordinara platano) estis solene plantita en la koro mem de la nova loko de la potenco por simboli liberecon. Mirakle ne detruiĝita dum la Resurtronigo (Restauration) kaj la Dua Franca Imperio, ĝi ankoraŭ majeste staras apud la katedralo kun siaj 33 metroj de alteco kaj sia 6-metra trunko-cirkonferenco. Ĝi estas unu el la plej antikvaj arboj de libereco en Francio.



### La ploranta fago de la botanika ĝardeno

En la botanika ĝardeno kreita, en 1864 de la fratoj Bulher, mirinda estas la fama ploranta fago, kiu aĝas ĉirkaŭ 160 jarojn. Ĝi situas iom malproksime de la aliaj grandaj arboj de la parko.



Tiu ĉi arbo altas ĉirkaŭ 20 metrojn. Ties trunko-cirkonferenco atingas 3,6 metrojn. Ĝia impona krono diametras ĉirkaŭ 40 metrojn. Ĝi tiel kovras cirklan areon de ĉirkaŭ 1.250 m<sup>2</sup>, tiel granda, ke ĝi estas subtenata de metala kadro por ke la branĉoj ne rompiĝu.

Post ĝi estis elektita en 2023 arbo de la jaro en Francio, la majesta mirindaĵo de la botanika ĝardeno kvalifikiĝis por partopreni en eŭropa konkurso kaj estis elektita en 2024 la dua plej bela arbo de la jaro en Eŭropo, malantaŭ pola kaj antaŭ itala arboj.

## Trovu la 32 kaŝitajn arbojn. Il povas kaŝi sin en ĉiu ajn direkton.

Atentu: en tiu tabelo, la supersignaj literoj aperas sen siaj ĉapeloj.

|   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| O | V | N | B | A | C | B | A | O | B | A | B | O | O | P | L | R |
| S | O | B | R | A | V | I | L | O | B | R | A | L | E | V | A | G |
| U | A | E | K | N | U | P | S | A | M | B | U | K | O | O | T | R |
| S | E | A | O | N | A | T | S | A | K | O | P | I | H | L | K | I |
| K | O | B | R | A | N | U | R | P | S | O | E | D | U | P | S | A |
| A | O | P | O | P | L | O | J | E | I | O | M | L | U | I | N | F |
| T | N | B | R | A | L | O | S | C | M | G | R | S | W | N | N | A |
| B | E | T | O | N | L | A | P | E | O | O | Z | P | W | O | O |   |
| A | S | I | F | L | B | A | H | R | R | O | L | D | U | B | P | B |
| O | K | F | I | A | B | M | S | I | E | P | R | O | R | J | O | R |
| B | A | I | I | I | G | C | A | Z | N | O | I | A | S | O | O | A |
| R | R | G | O | O | K | I | L | A | S | K | R | C | D | A | P | N |
| A | F | A | O | G | L | E | M | R | R | I | V | N | C | L | O | A |
| B | G | R | I | B | U | U | P | B | P | G | A | E | A | R | P | T |
| M | I | B | L | F | A | I | T | O | O | L | R | T | R | I | Z | S |
| O | N | O | I | A | H | B | G | E | G | O | A | C | C | K | I | A |
| P | K | K | T | G | P | O | L | U | B | N | E | E | I | N | O | K |
| P | O | A | R | O | O | S | J | U | O | N | O | G | I | O | T | A |
| N | U | E | M | I | K | A | R | P | E | N | O | L | A | R | N | E |

|             |          |
|-------------|----------|
| abio        | kverko   |
| acero       | olivarbo |
| alno        | piceo    |
| avelarbo    | pino     |
| baobabo     | pirarbo  |
| betulo      | platano  |
| ĉerizarbo   | pombarbo |
| ocipreso    | poploj   |
| fago        | prunarbo |
| figarbo     | saliko   |
| frakseno    | sambuko  |
| ginko       | sorpujo  |
| hipokastano | taksuso  |
| juglando    | tilio    |
| karpeno     | tremolo  |
| kaŝtandarbo | ulmo     |

## Ligu la esperantaj kaj francajn proverbojn.

- A** - Kiu timas bestaron, ne iru **arbaron**.  
**B** - Ne elvoku lupon el la **arbaro**.  
**C** - Sur **arbon** kliniĝintan saltas la kaproj.  
**D** - Altan **arbon** batas la fulmo.  
**E** - Lupo sopiras, al **arbaro** sin tiras.  
**F** - Se la **arbo** falis, ĉiu branĉo derompas.  
**G** - El post la **arbo** li estas bravulo.  
**H** - Pro multo da **arboj** li arbaron ne vidas.  
**I** - Unu hako **kverkon** ne faligas.  
**J** - Senfrukta **arbo** tamen ombras.  
**K** - Fleksu **arbon** dum ĝia juneco.  
**L** - Pli valoras la **arbo** ol siaj floroj.  
**M** - Ne falas frukto malproksime de l' **arbo**.  
**N** - En ĉiu **arbo** troviĝas sekaj branĉoj.  
**O** - En landoj transmaraj estas oraj **arbaroj**.  
**P** - Kia la **arbo**, tia la frukto.  
**R** - Nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas **arbaron**.  
**S** - Laŭ la frukto oni **arbon** ekkonas.  
**T** - Ĉiu **arbo** iam estis plantaĵo.  
**U** - Pli bone apuda najbaro, ol frato post **arbaro**.

- 1 - Hardi de la langue, couard de la lance.  
2 - L'herbe est toujours plus verte ailleurs.  
3 - Il faut plier le fer quand il est chaud.  
4 - Qui a peur du loup ne va pas au bois.  
5 - On juge l'arbre à son fruit.  
6 - Chassez le naturel, il revient au galop.  
7 - Ne réveillez pas le chat qui dort.  
8 - Les chiens ne font pas des chats.  
9 - L'eau retourne toujours à la rivière.  
10 - Mieux vaut bon voisin que lointain parent.  
11 - Les arbres cachent la forêt.  
12 - Tel père, tel fils.  
13 - L'arbre stérile du moins prête son ombre.  
14 - Rome ne s'est pas faite en un jour.  
15 - Mieux vaut l'arbre que ses fleurs.  
16 - Il n'est point de rose sans épine.  
17 - Quand le maître meurt, la maison s'écroule.  
18 - Il faut persévérer pour réussir.  
19 - Les loups n'attaquent que les brebis malades.  
20 - Qui s'élève trop près du soleil s'y brûle les ailes.

## Respondoj

A:4;B:7;C:19;D:20;E:6;F:17;G:1;H:11;I:18;J:13;K:3;L:15;M:8;N:16;O:2;P:12;R:9;S:5;T:14;U:10.

Ni profitis la somerajn feriojn por viziti Patron Marko en la abatejo Bricquebec. Bovenigis nin en la abateja hotelo Dom Simon-Marie, la abato.

Patro Marko, vernome Marcel Lemeltier, ne nur estas fama tra tuta Normandio kiel porkobredisto kaj kreinto de la abateja porkaĵfabrikejo sed ankaŭ tra Esperantujo kiel fakulo pri Eugène Lanti, la fondinto de SAT, kiu naskiĝis kelkajn kilometrojn for en la apuda vilaĝo Néhou.

Post dek jaroj, multaj esperantistoj ankoraŭ memoras la prelegon de Marcel (Legu en la [Normanda Esperanto-Bulteno n°261](#), pp. 5-6) en Dinan okaze de la kongreso de SAT nek lian bonvenon okaze de la ĝenerala kunsido de la normanda asocio, kiu okazis en la abatejo (Legu en la [Normanda Esperanto-Bulteno n°262](#), kaj [263](#), p.2).

Marcel ne nur parolas la francan, la anglan, la latinan, la hebrean kaj baznivele la germanan, la hispanan, la armenan lingvojn sed kompreneble regas la francan tiel kiel la normandan, siajn gepatrajn lingvojn kaj... Esperanton.

Sub la kaŝnomo Georges Montaignu, li verkis du librojn: *Les Marcassins Sacrés* (Thadée, 2012) kaj *Eugène Lanti, Rencontre avec un Citoyen du Monde* (Thadée, 2023), kiun li dediĉis al niaj karaj amikoj Jean Magerel kaj Yves Nicolas. Li nuntempe finpretigas novan libron en Esperanto pri la iama restado de la fama japana orkestrestro Ozawa en la abatejo de Bricquebec kaj pri la rilatoj inter la normanda abatejo kaj ĝiaj japanaj filinoj sed... estas ankoraŭ sekreto, baldaŭ ni scios... Pacienca ni kelkajn monatojn.



Notre-Dame-de-Grâce estas cistercia abatejo situanta en Bricquebec-en-Cotentin, en la normanda departemento Manche. La malgranda abateja komunumo, kiu konsistis el ĝis 80 monaĥoj nun konsistas el nur dek monaĥoj.

Le monaĥejo estis fondita en 1824 fare de abato Bon-Henry Onfroy (1777-1857). Ordinaciita pastro en 1806, li servis en Quettehou antaŭ ol fariĝi paroĥestro de Digosville. Ĉar li deziris dediĉi sin al la monaĥa vivo, li petis de sia episkopo la permeson malsekuliriĝi. Monsinjoro Dupont de Poursat akceptis, kondiĉe ke li starigu monaĥejon en la diocezo mem, kie tiam disponeblis multaj belaj abatejoj forlasitaj dum la Revolucio, sed Bon Onfroy ne havis monon por akiri ilin.

Nekultivatan marĉan terpecon apud urbeto Bricquebec oni donacis al li. La malriĉa bieno enhavis tri muelejojn en la najbara arbaro, domon kaj terenon ĉirkaŭ 8-hektaran. La komunumo instaligis surloke en Decembro 1824. La abatejo Port-du-Salut (Mayenne) sendis tri monaĥojn por helpi la 12 noviciojn malkovri la vivon laŭ la ordenregularo cisterciana. En de Julio 1825, Papo Leono la 12-a agnoskis la komunumon kiel priorejanaron alligitan al la Ordeno de Cîteaux. En 1834, la preĝejo estis konstruita. Du jaroj poste Notre-Dame de Grâce fariĝis abatejo laŭ decido de Papo Gregorio la 16-a. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj, la monaĥoj drenis la marĉojn, kreis laktofarmon, muelejojn, fromaĝo-fabrikon, bredis porkojn kaj korto-birdojn. Ili starigis monaĥan vendejon por vendi siajn porkaĵojn kaj fromaĝojn.



Fotis Bertrano





**La unua demando la legantojn certe mirigos. Kiun mi intervjuas? Ĉu kun Marcel Lemeltier? Ĉu kun Patro Marko? Ĉu kun Georges Montaigne? Kial vi estas trinomata homo?**

Kiam, en 1959, mi kandidatiĝis por akcepto en la abatejon Bricquebec, praktika problemo ekestis. Oni kutimis konservi sian baptnomon, sed jam ekzistis iu Patro Marcel. Oni proponis al mi mallongigi mian nomon. Tiel, Marcel (Marsel) ŝanĝiĝis al Marc (Marko)! En 2002, mi verkis libron "Les Marcassins Sacrés" ("La sanktaj porkidoj"), en kiu mi fikcie elvokis mian vivon kiel porkobredisto ĉe la abatejo. Mi ne volis impliki miajn fratojn en ĉi tiun personan aventuron. Tial mi elektis kiel "plumnomo" Georges Montaigne. Georges etas hazarde la nomo de mia patro kaj Montaigne devenas de la vilaĝo de mia infanaĝo, Placy-Montaigne.

**Kiel kaj kial vi esperantistiĝis?**

Mia patro, senantaŭjuĝa kamparano, havis mantron: "se ĉiuj homoj parolus la saman lingvon, ne plu estus militoj!" En la lernejo, amiko iam menciis al mi Esperanton. Ĝi estis dirita facile lernebla sed parolata ĉefe de liberpensuloj kaj framasonoj! Pro tio, la afero tiam ne allogis min. Pasis la jaroj. En 1982, mi decidis lerni la modernan hebrean. Mi aĉetis radioaparaton por aŭskulti "la Voĉo-n de Israelo". Tiel, en la katalogo de la mallongondaj elsendoj, mi malkovris tiujn de Radio Bern en Esperanto. Esperanto estis do vivanta lingvo! Mi petis amikon, kiu loĝis en Parizo iri al Rue de la Cerisaie kaj al Sat-Amikaro kaj aĉeti por mi lernometodon, vortaron, kaj... Biblion en Esperanto! Poste venis la serĉado de aliaj esperantistoj en la regiono. Ne estis grupo apud mi. Oni proponis al mi kontakti Yves Nicolas kaj aniĝi al la grupo de Hérouville. En la 1990-aj jaroj, grupo estis tamen kreita en Saint-Lô. Komence de 2000, fondiĝis la grupo Cherbourg, gvidata de S-ino Leloué.

**Certe ŝajnas strange, ke monaĥo kiel vi, memvole retiriĝinta el la sekulara mondo, lernu Esperanton, kies celo estas male faciligi malkovron de la mondo kaj de ties homa kaj kultura riĉecoj. Ĉu paradokso?**

Ni komencu per ŝerco. Mi dirus, ke mi ŝuldas ĉion al tiu nobla besto, la porko! Por provizi al la komunumo vivrimedojn, mi kreis liberpaŝtejan porkfarmon kun 2500 porkoj. Mi respondecis pri ili ĉiutage. Por plenumi tian lacigan taskon, mi devis trovi la necesan energion tagon post tago. Mi do kutimis aŭskulti "Radio Tirana", kiu ĉiutage grasis min per la grandioza kantado de "La Internacio" je la 7:30 matene...

Kiam mi pli konsciiĝis pri la celoj de la Esperanto, mi sentis profundan bedaŭron, ke la katolika eklezio, ne aŭdacis elekti Esperanton kiel sian lingvon.

Por doni pli ĝeneralan respondon, Bergson, siatempe, distingis inter fermita kaj malfermita religio. Mi ĉiam sentis min aparteni al ĉi-lastata. Religioj estas nur rimedoj por iri al Dio, kiu restas grandega mistero.

**Unuavide ŝajnas nekredeble, ke katolika pastro fariĝu fakulo pri Lanti, la fondinto de SAT, kiu estis vigla kontraŭreliĝulo? Kiel vi renkontis lin kaj kial li fariĝis vian vivkuniranto?**

Mi ne scias ĉu mi estas fakulo. Mi nur penis honeste legi lian verkaron kaj malkovri "la homon"! Mi malkovris tre turmentitan animon, plenan de demandoj, kiuj bezonis respondojn, homon trafitan de "la oceana sento".

Sinsekvaj koincidoj aŭ Providenco kondukis min al li. Unu tagon, ni vizitis la esperantan bibliotekon en Hérouville kun mia karega amiko Jean Magerel. Inter la titoloj estis kelkaj malgrandaj grizverdaj broŝuroj kun titoloj finiĝantaj per ...ismo. La nomo de E. Lanti unue mallogis min. Jean sciigis al mi, ke li estis ulo, kiu naskiĝis proksime de mi. Mi tiam ne esploris plu la aferon. La decidiga paŝo venis poste kiam mi legis, "Vivo de Lanti" de E. Borsboom. De la unuaj linioj, mi estis kaptita. Post la legado, mi verkis malgrandan artikolon en la loka ĵurnalo. Sekvis prelego en Néhou poste en Caen kaj Dinan. Tra la jaroj, mi tradukis la plejparton de liaj skribaĵoj. Mia profunda bedaŭro estas, ke ĝis nun neniu atestita historiisto volis interesiĝi pri la "senkompromisa homo". Tamen, lia aksiomo: "Pensu per via propra cerbo" faras lin ia Sokrato!

**Lanti naskiĝis en la apuda vilaĝo Néhou, kiun li forlasis, kiam li havis 15 jarojn. Ĉu ankoraŭ videblas en Normandio spuroj de lia vivo?**

Eĉ ne estas precize konata lia naskiĝdomo! Ĉio pri lia familio kaj infanaĝo estas "mistero", kies klarigon postulus tre scivolan Leŭtenanton Columbo!

**Jam de preskaŭ unu jarcento silentis Lanti. Ĉu vi opinias lian verkaron kaj penson ankoraŭ aktualaj? Kiujn tekstojn de Lanti vi opinias nepre legendaj?**

En la franca, la "Milittaglibroj", kiun li verkis dum la Unua Mondmilito. En Esperanto, la "Vojaĝo", pri lia vizito al Sovetio en 1922 estas facile legebla. Komencintoj legu lian membiografion "Fredo". Ek, ek al la legado!



La 9-an de Majo okazis tra la urbo Kaeno granda festo por memorigi la miljaran datrevenon de la fondiĝo de la ĉefurbo de Normandio.

Inter la 150.000 spektantoj estis kelkaj esperantistoj, kiuj rendevuis por kune profiti la 5-kilometran paradon kaj la spektaklojn.



Inter la ses proponitaj spektakloj, ĉiu ligita al periodo en la miljara historio de la urbo, la 350-metra karavano "parade opératique" transformiĝis de segmento al segmento kaj dronigis la publikon en mirindan mondon, ĝis la fina halto rande de la haveno, kie artfajraĵo kaj droneoj kuniĝis siajn buntajn lumojn en la ĉielo por oferti al ni nekredeble poezian kaj belegan spektaklon.

**1000 jaroj pasis de la fondiĝo de la urbo, ĉu ne estas bona okazo por rakonti la ĉefajn eventojn de ĝia historio? Jen la unuaj epizodoj. La sekvon vi legos en la venonta bulteno.**

**1025.** Kvankam la loko estis okupita jam de la prahistoria epoko, oni plej ofte interkonsentas datumi la fondiĝon de Kaeno laŭ la komenco de la 11-a jarcento, pli precize 1025, kiam unuafoje aperis la latina nomo *Cadomus* en la ĉarto de la abatejo de Fécamp, subskribita de Duko Richard la 2-a, per kiu li donacis al la abatejo fondita de sia patro grandan bienon, foirejon kaj havenon.



**1066.** La duko Vilhelmo elektis Kaeno-n kiel sian loĝurbon kaj decidis fortikigi ĝin. Inter 1060 kaj 1066, sur kalkŝtona sprono li konstruigis 5-hektaran kastelon, tiam la plej granda en tuta Eŭropo.

Ambaŭflanke de ĝi, li starigis du abatejojn, la abatejon de viroj kaj tiun de virinoj. Kaeno tiel fariĝis la sidloko de la duka potenco. Tiel pli kaj pli kreskis ĝia ekonomia graveco. Gajninte la batalon apud Hastings, je kristnasko 1066, Vilhelmo estis kronita reĝo de Anglujo en la abatejo Westminster.

**1105.** Post la morto de Vilhelmo la Konkerinto en 1087, lia havaĵo estis dividita inter liaj tri filoj. Robert Courteheuse, la plej aĝa, heredis Normandujon, Vilhelmo Anglujon kaj Henriko ricevis monon sed neniujn landposedaĵojn. Li profitis la morton de sia frato por ekkapti la tronon de Anglujo en 1100 kaj poste batalis por havigi al si Normandujon, kiun li invadis en 1105. Li eniris Kaeno-n en Aprilo. La sekvantan jaron, ekkaptinte sian fraton okaze de la batalo apud Tincheray, li plenumis la konkeron de Normandujo kaj atingis sian celon restarigi la reĝujon de sia patro. Ligita al la urbo, Henriko la 1-a plifortigis ĝian strategian pozicion. Li plialtigis la remparojn de la kastelo, konstruigis en ĝi loĝejturon kaj la Fiskohalon. Temas pri grava akceptejo, sidejo de la duka kortego kie okazis la plej gravaj potencceremonioj kaj loko, kie estis kalkulataj la impostojn ŝuldatajn al la duko de la lokaj sinjoroj. Ĝi ankaŭ estis la duka juĝejo.





**1206.** Kiam forpasis Henriko la 1-a en 1135 sen vira heredanto, Mathilde, lia filino, devus esti heredinta la kronon sed Étienne de Blois, la nevo de la forpasista reĝo, sukcesis ekkapti la anglan kronon kaj la normandan duklandon. Nur en 1144, Mathilde kaj ŝia edzo, Geoffroi de Plantagenêt, sukcesis reakiri la normandan tronon. Ilia pranepo, Sentera Johano, rajtigis en 1203 Kaeneo-n akiri sonorilon, kaj urbodomon. Keano fariĝis tiel aparta komunumo. Sed, pretekstante la murdon de lia nevo far Johano, la franca reĝo Philippe Auguste decidis konfiski lian havaĵon. Tiel Normandujo fariĝis en 1206, dependlando de la franca reĝlando.

**1346.** Dum la Centjara Milito, plurfoje estis pridisputata la urbon inter la anglaj kaj la francaj reĝoj. Eduardo la 3-a de Anglujo pretendis la francan kronon. Elŝipiĝinte ĉe Saint-Vaast-la-Hougue la 12-an de Julio 1346, li direktiĝis al Kaeno, kiun li atingis la 26-an kun 40 000 soldatoj. Li sukcesis konkeri la urbon la saman tagon malgraŭ furioza rezisto de la Kaenanoj. Li ordonis bruligi kaj prirabadi la urbon kaj forlasis Kaeno-n la 31-an, akompanata de la plimulto de sia armeo, por direktiĝi al Kalezo. Post lia foriro, la kaenanoj ekstermis la garnizonon de 1 500 viroj, kiun la angla reĝo estis postlasinta por okupi la urbon, kaj ricevis permeson de la franca reĝo Filipo la 6-an rekonstrui la urboremparojn je sia propra elspezo kaj ĉirkaŭbari la du abatejojn.



...Sekvota...

**Krome, ne forgesu: ni eldonis senpagan gvidlibron pri Kaeno kaj Hérrouville Saint-Clair, kiun vi povas elŝuti de nia libroservo.**

<https://bit.ly/HE-libroservo>



## Festo en Kaeno (Caen): « La Parade Opératique »

*Multaj eventoj okazis por memorfesti la milan datrevenon de la fondiĝo de la urbo Kaeno, ekzemple la granda parado, kiu nomiĝis « La Parade Opératique ». Temis pri procesio de multaj diversaj kulturaj asocioj tra la stratoj de la urbo, organizita kiel opero. Ĝi okazis la 9-an de Junio, de 6-a vespere ĝis la 1-a matene. La parado estis kvin kilometrojn longa. Proksimume 150.000 spektantoj ĉeestis kaj profitis la bonhomoran etoson.*

*Ne eblas al mi priskribi tiun grandiozan paradon. Prefere rigardu tiun [filmeton](#): vi povos per ĝi admiri la spektaklon kaj virtuale partopreni en la mirinda finalo kun artfajraĵo kaj belega droneo-spektaklo...*

*Ni ofte aŭdas pri mortigaj droneoj. Ili prefere estu uzataj tiel, ke okaze de mirindaj spektakloj, ili kunportas belajn mesaĝojn pri paco.*


<https://www.youtube.com/watch?v=TyaxLHWYEno>

## LA KANTANTA ARBO.


<https://bit.ly/HE-libroservo>



### Unuafoje disponeblas en Esperanto verko de Bernard Clavel.



Bernard Clavel (1923-2010) estis popola kaj populara franca verkisto, gajninto la 1968-datitan Premion Goncourt. Humanisto kaj nelacigebla aktivulo por pacifismo kaj respekto al la naturo, li ankaŭ verkis por la infanoj al kiuj li klopodis heredigi siajn valorojn. Ĝis nun, neniu verko de Clavel estis esperantigita. Jen la unua.



**Isabelle kaj Gérard vivas laŭ la ritmo de la sezonoj, en la dometo de siaj geavoj, for de la vilaĝo, proksime de la arbaro ĉe la piedo de la ĵurasa monto.**

**Apud la domo estas acero de du jaroj mortinta.**

**Iun vintran matenon, stranga homo vizitas la familion. Li estas Paĉjo Vincendon, delonga amiko de la avo.**

**Pri la arbo, li pledas por ke la avo ne dehaku ĝin: "ĝi ne estas mortinta, mi kantigos ĝin", li asertas al la geavoj. "Vi vidos, ĝi kantos eĉ pli bone ol kiam ĝi havis siajn brakojn plenaj je birdoj", li promesas al la infanoj.**

**Ĉu vere? Kiel do kantus arbo kaj kiel faros Paĉjo Vincendon? Ĉu li estus sorĉisto?**

**En la lastaj paĝoj, malkovru la sekreton de Paĉjo Vincendon.**

5€

+ sendokostoj: Francio 3,00 €; Aliaj landoj 4,50 €

32 paĝoj ilustritaj de Yanpetro Kavlan - formato A5 - ISBN 978-2-9599130-0-6 - Eld. Hérouville-Espéranto

### Kiel mendi kaj pagi?



Prefere mendu ĉe la retejo Hello-Asso, alklaku tiun ĉi ligilon: <https://bit.ly/HE-libroservo> kaj pagu per bankokarto



aŭ mendu ĉe Bertrand Verstraete, [esperanto.herouville.14200@gmail.com](mailto:esperanto.herouville.14200@gmail.com), 1 rue du Centre, F-14730 Giberville kaj pagu per ĉeko je la nomo de Hérouville-Espéranto.

Atentu: ne forgesu la sendokostojn. Francio 3,00 €, aliaj landoj 5,00 €.

### ... "Ekbruligu, en la kameno, la lastan fajron de la jaro!"

Colette, vernome Sidonie-Gabrielle Colette, forpasis antaŭ 70 jaroj en 1924.

**Jen proponita de Bertrano kaj Dominik' (†), traduko de "La lasta fajro", unu el ŝiaj noveloj eldonita en 1908. En tiu poezia teksto, pri la efemereco de l'amo kaj de l' vivo.**

Tiun mallongecon simbolas metafore fajro. Ĝi ekbrulas, brilas, varmegas, sed finfine, finvintre, kiam renaskiĝas printempo, estingiĝas. El ĝi, nur restas spuroj, nostalgiaj rememoroj belstile priskribitaj de la fama verkistino, aktorino, ĵurnalistino.

**Senpage elŝutebla libreto - Alklaku la ligilon: <https://bit.ly/HE-libroservo>**



0€

## Amikumu



**Amikumu estas senpaga malfermitkoda apo**, kreita de Chuck Smith kaj Richard Delamore, du esperantistoj, **per kiu vi povas trovi kaj kontakti la 100 pli proksimajn samlingvanojn ĉirkaŭ la loko kie vi estas.**

Ĝi estas elŝutebla kaj por [androidaj poŝtelefonoj](#) kaj por [iPhone poŝtelefonoj](#). Pli ol 500 lingvoj estas parolataj de la pli ol 11.000 uzantoj. Plejmulte el ili parolas la anglan sed Esperanto estas la dua pli uzata lingvo!

Kiel uzi ĝin?

- Unue elŝutu kaj instalu la apon.
- Kreu konton permane aŭ aŭtomate per Fejsbuko.
- Elektu la cellojetojn, kiujn vi parolas kaj precizigu je kiu nivelo vi kompetentas.
- Skribu vian kutiman nomon kaj priskribon por ĉiu lingvo, kiun vi celas uzi.
- Filtru la liston por trovi la 100 plej proksimajn homojn, kiuj parolas viajn cellojetojn.
- Kontaktu ilin kaj ekamikiĝu!

## Kiuj estas la plej parolataj planlingvoj en Amikumu?

|                                |                                    |                           |
|--------------------------------|------------------------------------|---------------------------|
| Esperanto : 16 615 parolantoj! | Lingua franca nova : 33 parolantoj | Kotava : 8 parolantoj     |
| Toki pona : 823 parolantoj     | Volapük : 31 parolantoj            | Novial : 6 parolantoj     |
| Ido : 102 parolantoj           | Interlingue : 21 parolantoj        | Interglosa : 6 parolantoj |
| Klingon : 80 parolantoj        | Pandunia : 21 parolantoj           | Slovio : 6 parolantoj     |
| Interlingua : 74 parolantoj    | Quenya : 16 parolantoj             | Neo : 3 parolantoj        |
| Lojban : 69 parolantoj         | Sindarin : 10 parolantoj           | Angos : 3 parolantoj      |

## Coup de gueule...

Chez Duolingo, son PDG l'affirme sans vergogne, on a "compris l'importance d'associer l'expertise humaine et l'intelligence artificielle pour tirer parti de leurs atouts respectifs", "les humains et l'IA s'allient pour proposer un enseignement de qualité" et bien sûr n'en doutez pas, l'entreprise "se soucie profondément de ses employés".

Quelle belle histoire ! Quel affreux mensonge !

L'entreprise se soucie en réalité bien davantage de ses bénéfices et entend se séparer progressivement de ses prestataires de service et de ses collaborateurs pour les remplacer par l'intelligence artificielle.

C'est par un simple courriel qu'ils l'ont appris de leur patron, Luis Von Ahn.

Ils devront à l'avenir privilégier l'utilisation de l'intelligence artificielle dont la maîtrise d'usage "fera partie des critères d'embauche" et d'évaluation "lors des examens de performance".

On ne recourra à un humain que pour autant qu'il ne sera pas possible de le remplacer par l'intelligence artificielle et qu'importe le coût social et environnemental.

Parallèlement, on apprend dans la presse économique que le titre l'entreprise qui pèse aujourd'hui plus de 20 milliards de dollars en bourse, a progressé de 150 % en un an à Wall Street, de plus de 40% depuis le début de l'année et que, pour 2025, elle vise le milliard de dollars de chiffre d'affaires, en hausse de 32% par rapport à 2024, grâce au développement de... l'intelligence artificielle.

Tout s'achète et tout se vend !

Zamenhof lui, n'a jamais voulu tirer le moindre profit de son travail et a traité chacun avec respect.

Mieux vaut se tourner vers l-Kurso ou Lernu.net ... Ou, mieux encore, nous rejoindre le mardi !

Kun Marie-Anne ni partoprenis en M.E.S, la **Mediteranea Esperanto- Semajno**, kiu okazis dum unu semajno, **de la 15-a ĝis la 22-a de Marto** en la urbo **Les Issambres**, en belega hotelo, nur 50 metrojn for de la strando! Ĉirkaŭ **60 samideanoj** ĉeestis, el Francio, Belgio, Hispanio, Germanio, Italio, eĉ tri homoj venis el Rusio aŭ Ukrainio.

Matene, tri kursoj estis proponitaj, inter kiuj ni povis elekti:

- **Lingvo por komencantoj** (instruis Rodica Todor, Rumanio)
- **Esperanta literaturo** (instruis Pavel Fischer-Kotowski, Pollando)
- **Ekologio** (instruis Manfred Westermayer, Germanio).

Tiun kurson ni plej ŝatis. Temis pri aktualaj problemoj: maro, klimato, rubaĵoj...



**ROQUEBRUNE.** Une soixantaine d'espérantistes étaient réunis aux Issambres pour une semaine rythmée par des ateliers, des conférences, des échanges variés...

**L'espéranto, la langue  
« qui unit les peuples »**

PAR FRED H. / SAINT RAPHAËL (BNCHEZAT/17)



Posttagmezoj estis liberaj, ni do turismis al najbaraj urboj: ni gavis vidante la karnavalon en Saint-Raphaël kaj ĝuis la ege interesajn promenadojn en Fréjus kaj Grimaud.

Inter Caen kaj Les Issambres estas pli ol 1.000 kilometroj. Ni do duonigis niajn vojaĝojn, en Vichy irvojaĝante, en Paray-le-Monial kiam ni reiris hejmen. Tiu urbo estas fama por pilgrimo kaj ceramiko; tie, 3 fratinoj kiuj parolas esperanton ĉiĉeronis nin.

Do, ni ĝuis fruktodonan periodon en agreebla etoso.



**En la komenco de Junio okazis la 113-a kongreso de Espéranto-France en Nanto.**

Ne malpli ol 7 klubanoj partoprenis en la nacia kongreso dum kiu Bertrano estis elektita komitatano de la nacia asocio.

Tiel estos plifortigitaj la ligiloj kun la aliaj esperantistoj tra Francio.

J'avoue n'avoir compris que peu de choses à la conférence sur Jules Verne. Il aurait été souhaitable que le niveau requis pour profiter au mieux de chaque activité soit plus clairement indiqué.

Pas facile pour ceux qui n'étaient pas dans le premiers rangs de voir et d'entendre.

En revanche, le film de Gabin (\*) était sous-titré en Français et il a échangé avec nous dans un Esperanto qui m'était compréhensible, n'hésitant pas à passer au français quand c'était nécessaire, y compris pendant le repas que nous avons partagé avec lui.

Ambiance bienveillante dans le cours de Lucette, qui a adapté son intervention initialement destinée à de vrais débutants à notre niveau intermédiaire.

Ambiance très sympathique ; les bénévoles étaient accueillants et les participants aussi !



Raportas Bertrand  
el Hérouville

En Nanto, unuafoje mi partoprenis en Esperanto-kongreso. Tiukaze, mi multe lernis. Mi rapide renkontis kelkajn E-parolantojn el Bretonio, Luarlando kaj Vendeo.

Mia neesperantista edzino kaj mi sabaton kaj dimanĉon vizitis Nanton. Ni aparte ŝatis "La Insulajn Maŝinojn".

Mi partoprenis en la kurso por komencantoj kaj ĉeestis la ĝeneralan kunsidon. Tiel mi pli bone komprenis la vivon de la movado kaj de Espéranto-France.

Multaj klubanoj el Hérouville partoprenis en la kongreso. Tio certe helpas revigligi la movadon en nia regiono: kial ne jesi la proponon ricevitan de la estraro de Espéranto-France organizi la 2026-an kongreson en Normandie?

(\*) Esperanto antaŭen

<https://www.youtube.com/watch?v=6m3Ffodblyk>



Raportas Françoise  
el Noyers-Bocage



J'ai commencé à apprendre l'espéranto en octobre 2024.

Comme le congrès national se tenait Nantes, ville voisine, cette année j'ai souhaité y assister.

Ce furent des journées "crocodiles" mémorables passées à écouter avec plus ou moins de compréhension. La conférence sur Jules Verne et ses relations avec l'espéranto m'intéressait en soi beaucoup mais suis restée frustrée! Elle eut été davantage attrayante accompagnée de documents visuels. Peut-être un document sera-t-il produit par Istvan Ertl...

Quant au film captivant "Esperante Eŭropen - mon voyage à la découverte de l'espéranto", j'étais heureuse de mieux le suivre..

Quel enthousiasme suscité par l'atelier de chant mené par Kajto à la diction si claire avec projection des textes de courtes chansons ! Même plaisir le dimanche soir à les écouter, les voir évoluer dans une mise en scène simple et variée, à reprendre joyeusement en fin de concert une mélodie apprise l'après-midi!

Les deux premiers cours pour débutants auxquels j'ai assisté avec les six autres espérantistes hérouvillais ont permis de rafraîchir la mémoire et d'aborder des points plus délicats : les corrélatifs, les verbes transitifs, la construction des mots. Stupéfaction de la professeure devant notre niveau et notre progression rapide. Le troisième cours allait porter, à la demande des participants, notamment sur les participes actifs et passifs dans les trois temps. Bref ces cours m'ont convenu et ont renforcé mon souhait de poursuivre l'apprentissage de la langue ! Multiples échanges pendant le vin d'honneur à l'issue de l'ouverture du congrès et l'apéritif des régions avec les abondants et délicieux plats apportés par les congressistes. Enfin j'ai aimé passer du temps à regarder les belles expositions créées par les espérantistes de Nantes l'une sur la langue, l'autre intitulée : l'extraordinaire aventure à vélo de Lucien Péraire, de l'Europe au Japon.

Sur une petite table dans un coin trop discret étaient exposés quelques exemplaires de la revue trimestrielle : Esperanto-info, Céline a eu l'idée astucieuse de faire des sets de table avec les dessins de sa mère sur des points de grammaire ou de vocabulaire. Bilan : achat de six sets et abonnement à la revue pour un an que je partagerai avec l'asso espérant d'Hérouville !

Plusieurs passages à l'étage dans la librairie... et quelques acquisitions !

Deux journées denses en échanges... et à renouveler ailleurs. Il m'a été dit que dans les congrès à l'étranger, les progrès linguistiques sont spectaculaires!

Hodiaŭ estas escepta tago kaj la plej bona momento por paroli pri la kongreso!

En ĉi-tiu teksto, mi ne volas rakonti pri prelegoj ktp, sed klarigi kial mi ĝojis partopreni en la kongreso. Dum la kongreso, homoj parolas pli-malpli bone en Esperanto. Tamen, neniu subtaksis aliajn homojn kun malfacilaĵoj. Ĉiuj ŝajnis feliĉaj, sufiĉis all ili esti kune. Mi neniam parolis Esperanton kun aliaj homoj, krom en nia klubo. Tamen, mi kun ĝojo sukcesis kompreni multajn homojn kaj paroli per kelkaj vortoj. Sed, estanta komencanto, mi konfesas, ke mi de tempo al tempo krokodilis. Tamen partopreni en kongreso estas ja bona rimedo por paroli la lingvon.

Post la konferencoj kaj ekskurso en Nanto, mi havis ideon. Ĉu mi povis sukcesi ekzamenon? Frenezulo mi ja estis ! Mi registriĝis por trapasi la unuan nivelan ekzamenon de la Franca Esperanto Instituto (FEI). Atendante mian vicon, mi malkovris aliajn kandidatojn ... kun bona nivelo, kun sperto jam de kelkaj jaroj. Parolante kun ili, mi lernis novajn vortojn ... bone! Esperanto permesis interparoli kaj klarigi vortojn ... Neatendinte, mi lernis : "kubo" (la objekto), "nepre", "tasko" (la vorto aspektas kiel la anglan vorton), "trapasi" - ĉiuj diris: "Ĉu vi trapasas la ekzamenon?", sed... mi ne komprenis -. Dum la ekzameno, mi timis kaj ne komprenis ĉiujn vortojn. Sed, mi sukcesis klarigi la plejparton de la aferoj, kiujn mi vidis en la proponitaj bildoj...

Nu, vi certe volas scii, kial hodiaŭ estas speciala tago?

Mi ĵus ricevis la rezulton ... Mi sukcesis la ekzamenon !!!





Claude, Marie-Anne kaj François partoprenis en la 110-a UK en Brno  
Ili raportas.



*Saluton, bonan tagon gekaraj !*

*Triope, Marie-Anne, François kaj mi laste partoprenis UKon en Brno/Moravio/Ĉeĥio. Ni tien trafis per aŭto, pli ol 1.400 kilometrojn por veturi! Duone, irante ni haltis en Heilbronn, kaj revenante ĉe samideanoj de Strasburgo.*

*En tiu 110-a kongreso ĉeestis pli ol 1100 homoj el 63 landoj, kun aĝa mediano de 63 jaroj. Ĉefe temis pri Esperanto kaj teknologio kiel pontoj de paco kaj konfido inter popoloj.*

*Ni kune travivis kiel en aliaj UKoj specialan semajnon; ĉio estis klare kaj bonege organizita. Ni povis elekti inter diversaj kursoj, konferencoj, ekskursoj, koncertoj... Ni povis aĉeti aŭ vendi librojn en "Libro servo".*

*Ni ofte manĝis surloke en la universitata restoracio kaj havis korektan dormĉambron ne tro fore (1,5 km). Krom prelegoj pri sciencoj, lingvoj, historio de Esperanto, eĉ pri "Notre Dame de Paris" ni elektis ekskursojn en fama loko por francoj : Austerlitz nun Slavkov (batalo inter la 3 imperiestroj). Ni ankaŭ vizitis la esperantan muzeon de Svítavy -kie okazos la venontjara kongreso de SAT- kun interesaj geĉiĉeronoj. Ĉiu vespero okazis spektaklon, teatraĵon, muzikon kun grupo kiel Kajto aŭ Kaŝi. Okazis folkloro vespero kun ĉeĥa muziko. Dum tiu semajno, Ferdinand Maja (Brazilo) anstataŭis Duncan Ĉarters kaj la estraro parte ankaŭ ŝanĝis. Ĉiutage ni povis scii kio okazis per gazeto "Drako".*



Raportas Claude kaj Marie-Anne el Caen

*Mi vere ĝuis mian unuan kongreson de UEA en Brno. Mi renkontis tre diversajn homojn el la tuta mondo. Ĉiuj estis toleremajn kaj senantaŭjuĝajn. Mi ĉeestis prelegojn en Esperanto pri tre diversaj temoj, partoprenis kursojn de la ĉeĥa lingvo, kaj vizitis la botanikan ĝardenon (omage al la patro de genetiko, Mendel) kaj la lokon de la Batalo de Austerlitz. Kvankam mi ankoraŭ ne havas bonan nivelon de Esperanto por plene ĝui ĝin, mi trovis ĝin ekscita kaj esperas partopreni en la kongreso en Graz!*



Raportas Fransoa el Hérouville Saint-Clair

## UK 2026 okazos en Graz, Aŭstrio.

Kutime, la kongresurbon de la venonta kongreso oni anoncas 2 jarojn antaŭe. Multe malfrue la elekto de la urbo, kie okazos la 111-a Universala Kongreso. Tre malfrue, la 29-an de Junio la estraro de UEA finfine decidis kaj sciigis, ke la UK en 2026 okazos en Graz, la dua plej granda urbo de Aŭstrio de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2026. Jam oni povas aliĝi per [tiu ligilo](https://cutt.ly/Gvidilo_Pri_Graz).

42-paĝa gvidilo en Esperanto pri la urbo estas senpage elŝutebla ĉi-tie: [https://cutt.ly/Gvidilo\\_Pri\\_Graz](https://cutt.ly/Gvidilo_Pri_Graz). Surpapera versio de ĝi disponeblas en nia biblioteko.



Klaku tie ĉi por aliĝi

Brno ne estas nekonata urbo de la normandaj esperantistoj. Samtempe kiam okazis la 28-a kongreso en Vieno, en Aŭgusto 1936, estis organizata far la lokaj esperantistaro kaj de la loka radiostacio granda ekspozicio pri Esperanto en la najbara urbo Brno, 130 kilometrojn for.

Iu normanda samideano anonima (verŝajne S-ro Saget aŭ S-ro Parrington) entuziamse raportis pri ĝi en la oktobra "Bulletin de la fédération espérantiste de Normandie". Jen la traduko de la artikolo.

## KONGRESO DE 1936.

Tre detalaj raportoj pri la kongresoj de Vieno kaj Budapeŝto aperis aŭ aperos en "Esperanto Triumfonta", "Mia Gazeto", aŭ "Franca Esperantisto", kiujn ĉiu bona federaciano ricevas. Tial ni opinias nenecese diskuti ilin en nia modesta bulteno, sed ni ŝatus transdoni al vi artikolon, kiun ni ĵus ricevis.

### LA BRNA ESPERANTISTA EKSPOZICIO

Grava evento, kiun la esperanta prozo ne sufiĉe menciis, estas la Brna Esperantista Ekspozicio (Ĉeĥoslovakio), kiu estis malfermita al la publiko dum la tuta monato Aŭgusto. Ĝin organizis la esperantistoj de Moravio kun la helpo de la granda radiostacio de Brno. Ĝi okupis du grandegajn halojn en la urbocentro. Ni vizitis ĝin tri fojojn, tiel interesa ni trovis ĝin.

Ni senhezite deklaras, ke ni neniam antaŭe vidis tian ekspozicion, tiel zorge prezentitan kaj tiel riĉan je dokumentaĵoj. Nenio estis amasigita: ne estis malordo, sed ordo kaj metodo.

Ĉirkaŭ tridek kadroj montris, lando post lando, la broŝurojn kaj turismajn gvidilojn en Esperanto eldonitajn en la lastaj jaroj en la diversaj landoj. Vitrinoj montris komercajn cirkulerojn en Esperanto, reklamajn poŝtmarkojn (inkluzive de tiuj el Elbeuf), oficialajn poŝtkartojn kun esperantaj tekstoj el Liĥtenŝtejno, Brazilo, Hungario, ktp.

La muroj estis kovritaj per komercaj kaj turismaj afiŝoj en Esperanto.

Eblis al la vizitantoj admiri grandan kolekton de revuoj kaj librojn en Esperanto pri literaturo, scienco, arto, historio, geografio, religio, ktp.

Ankaŭ estis multaj fotoj de universalaj, naciaj, lokaj, religiaj, skoltaj kongresoj, ktp.

Multaj homoj miregis ĉe la vitrinoj montrantaj la progreson de Esperanto en Ĉinio, Persio, Egiptio, kaj precipe Japanio, same kiel doktorajn disertaĵojn, librojn pri medicino, farmacio, kaj veterraportojn.

Radio Brno, konata kiel la "Verda Stacio", montris fotojn de la artistoj de TRAKT (TRupo de Esperantaj AKTorj) kaj grandan kolekton de leteroj ricevita de Esperantaj aŭskultantoj el diversaj landoj. (Ĉu vi scias, ke la stacio jam ricevis pli ol 600 gratulleterojn pro siaj vesperelsendoj dediĉitaj al Esperanto?)



## Armel gajnis la 51-a kantoparadon



Ĉiujn du monatojn, la Ratkaptista Bando - Esperanto-grupo en Hamelno, Germanujo, organizas retan kantoparadon. La 51-an konkurson gajnis en Marto, nia amiko Armel Amiot, la fama normanda esperanto-kantisto kun sia bela kanzono [“Amikeco”](#).

Post aŭskultado de 9 kanzonoj kaj diskutado, la partoprenantoj voĉdonis por siaj plej ŝatataj kantoj, ĉu per reta balotsistemo, ĉu okaze de la Zoom-kunveno.

Armel gajnis 58 poentojn. [Kanto de mulisto](#), el la KD Oraj Kantoj, de Novella Matvejeva tradukita Mikaelo Bronŝtejn kaj [En la profund’](#) de Börje Lund gajnis ambaŭ 41 poentojn. La venontaj kantoparoj estos anoncitaj de la retejo [Eventa Servo](#).

## La heruvila Skvaro Esperanto finfine aperas en guglaj mapoj.

Kvankam, ĝi estis oficiale inaŭgurita en 2014, Guglo-mapoj ĝis nun neniam akceptis registri nian skvaron malgraŭ pluraj petoj. Ĝi ne estis aperanta en la mapoj. Sed ni ne rezignis kaj finfine, ni sukcesis! Skvaro Esperanto nun estas videbla sur la mapo.

Tamen uzu prefere la kunlabora maparo [OpenStreetMap](#). Ĝi estas eŭropa, malfermita kaj disponeblas en Esperanto.

Ĝi delonge kaj krome pli precize ol Guglo registras la lokon.



## Festo de la marĉo en Giberville



Sabaton la 24-an de Majo okazis en Ĵibervil’ la Festo de la Marĉo. Tiukaze, deko de niaj klubanoj proponis publikan dulingvan legadon de kelkaj eltiraĵoj de *La Kantanta Arbo*, la rakonto de Bernard Clavel, kiun ni esperantigis kaj eldonis.

Malmultis la aŭskultantoj, kiuj vizitis nin. Tamen, post la legado, ni sufiĉe longe interŝanĝis pri Esperanto. Kelkaj homoj jam iom aŭdis pri Esperanto sed plejparte tute malkovris ĝin kaj interesiĝis pri ia lingvo.

Tre agrablaj ankaŭ estis la kuna tagmanĝo kaj la momentoj, kiujn ni pasigis kune. Krome, estis bona okazaĵo trejni nin pri laŭtvoĉa legado kaj ĝusta prononcado.

Poste, kelkaj samideanoj daŭrigis la vesperon partoprenante en la festo “Les Plateaux Éphémères”, dum kiu Veronik’ kaj Jozian’ saksofonis kun sia latunbando.



## Sekvenda afero: nova normanda Zeo ĉe l’horizonto!

La urbestro de Ĵibervil anoncis, ke li proponos nomi “Strato Zamenhof” unu el la stratoj de la kvina fazo de la nova kvartalo “Les Jardins de Clopée”.

Tamen, ni estu paciencaj: tiu parto de la kvartalo estos inaŭgurita post kvar ou kvin jaroj.

# ĜENERALA KUNSIDO & ESPERANTISTA REGIONA MALFERMITA KUNVENO

RESENDU VIAN ALIĜILON KIEL EBLE PLEJ FRUE,  
PREFERE ANTAŬ LA 15-AN DE SEPTEMBRO.

La 4-an de Oktobro 2025:

Hérouville-Espéranto proponas Esperantistan regionan kunvenon malfermitan, kies temo estos: "Normandoj, indiĝenaj aŭ enmigrintaj, kiel ili kontribuis riĉigi Normandion?"

Sabaton  
la 4-an  
de Oktobro



## Kiam?

- Sabaton la 4-an de Oktobro
- je la 9-a por la klubanoj
- je la 10 k. 20 minutoj por la aliaj homoj

## Kie?

- Ĉe l'Annexe
- (malnova biblioteko de Plateau)
- Rue de l'Hôtellerie, Mondeville

Nomo k. propra nomo : .....

Adreso : .....

Retpoŝtadreso : .....@.....

Telefonnumero : .....

**Mi partoprenos en la kunveno kaj pagas 25 € (inkluzive de la vizito kaj de la manĝo).**

☐ **Mi estas membro de Hérouville-Espéranto ...**

- ☐ ... kaj mi ĉeestos la ĝeneralan kunsidon kaj la malfermitan regionan kunvenon.
- ☐ ... sed mi ne ĉeestos la ĝeneralan kunsidon nek la regionan kunvenon.

La decidoj de la ĝenerala kunveno nur validos kun atingita kvorumo.

**Vi ne partoprenos? Ne pre donu prokuron. Mi donas prokuron al .....**

☐ **Mi ne estas membro de Hérouville-Espéranto, mi nur partoprenos en la malfermita regiona kunveno kaj pagas 25 € (inkluzive de la vizito kaj de la manĝo).**

## Kiel pagi?



Aliĝu per la retejo Hello-Asso, alklaku tiun ĉi ligilon:  
<https://cutt.ly/04-10-2025> kaj pagu per bankokarto.



aŭ resendu la aliĝilon ĉe Christian Marlier, 11 rue des Frères Colin - F 14000 Caen  
La ĉeko estu je la nomo de Hérouville-Espéranto.

